

JUNIO 2015



La «Espéranto-Gironde» Informilo

N° 143

ESPERANTO GIRONDE eldonas novan KD-on



Morine STRIDE kaj Isabelle DIAZ
kantas la amon (vd. p.5)

ESPERANTO-GIRONDE KUNVENO DE LA 15-a de FEBRUARO 2015



Ĉeestas : Janine, Yannick, Monique, Christiane, Michel, Marcelo, Morine.
Senkulpigitaj : Joël, Claudine, Bernard et Rose S.

1. Affaires diverses

Marcelo souhaite que l'on contrôle les différences entre les textes désormais fixés sur le site et le diaporama.

Yannick soumet la demande de FaMo pour que le site des Kompanoj soit bilingue. Les gens présents désapprouvent : proposition rejetée.

D'autre part les fichiers envoyés par Françoise sont trop lourds : ils ne peuvent donc pas être mis sur le site.

Monique demande à Yannick d'enregistrer le document sur les Marais (TGL) en pdf.

Marcelo verra la « mère » du géant Naturamiko lors du stage de Châlons en Champagne et se renseignera sur la façon de le manier, le déplacer etc.

D'autre part, le spectacle de la Nacia Vespero (dimanche soir) est modifié : les artistes belges (Nikolin' et Laurent) qui devaient interpréter Brel ne seront pas disponibles. Peut-être fera-t-on une partie du spectacle avec les artistes en vidéo.

2. Répétition

Isabelle arrive vers 11h et nous répétons plusieurs chansons de la surstrata kun-kantado jusqu'au repas.

3. Le CD

Le premier jour d'enregistrement sera le 26 février, précédé de trois jours de répétition. Il y aura en tout 3 journées d'enregistrement réparties sur plusieurs semaines.

Le CD comportera 12 titres, de l'époque baroque avec Haendel et Vivaldi, à Brel et Bette Midler ; l'amour à travers les époques en est le fil conducteur. Les chants sont en français, italien et espéranto.

Après discussion, l'accord se fait sur le titre : L'Amour au cœur – Amrenkontoj

Le nom des artistes est aussi discuté. Finalement tout le monde s'accorde sur Morza (avec un « i » majuscule au milieu), proposé par Morine. Le nom des Kompanoj apparaîtra sur la pochette.

Budget prévisionnel :

Marcelo présente le budget prévisionnel, qui s'établit à environ 3000 (dépenses : 3150€ ; recettes, en comptant les ventes de CD sur quatre ans : 3170€).

La journée d'enregistrement coûte 300€ (le tiers du prix normal)

Le mixage et le mastering coûtent également 300€ par jour (compter deux jours).

Le graphisme de la pochette ne coûtera rien, puisqu'il sera objet de diplôme universitaire de fin d'études d'un fils d'Isabelle.

Morine propose le choix entre deux maquettes déjà composées : le choix se porte sur la blanche, avec profil stylisé en rouge.

L'emballage du CD sera une pochette cartonnée accompagnée d'un livret contenant le texte de tous les chants. Le coût de pressage de 500 CD est de 780€ sans le livret. On se fixe une dépense maximale de 1200€.

Les disques seront prêts pour le Congrès de Lille et peut-être même pour le stage de Bouresse à la mi-juin.

Une partie du financement se fera par souscription : le prix fixé pour la souscription est de 8€ port compris. Ensuite le disque sera vendu 10€.

On peut aussi se renseigner sur un financement participatif de type Ulule.

Le CD pourra être proposé au libroservo du congrès, mais aussi en vente directe, par des moyens divers. On pourra peut-être, par exemple, utiliser le géant Naturamiko, avec notre banderole. Michel propose d'arranger une mallette de façon à pouvoir y ranger des CD à vendre.

De toute façon il est sûr que la plupart des ventes se feront lors des concerts de proximité.

4. Surstrata kunkantado : livret

Pour que le livret soit bien lisible, on choisit une disposition en A4 agrafé.

5. Fin de la réunion

Une jeune femme arrive peu avant la fin de la réunion, intéressée pour apprendre l'espéranto. Rendez-vous est pris pour le lundi de la rentrée des vacances d'hiver.

On travaille quelques instants sur une mise en scène de *Ĉi ular'* (*Ces gens-là*).

La réunion se termine vers 17h.



RAPORTO PRI LA REGISTRADO DE LA KD DE Moríza

London, la 4an de aprilo, ni kunvenis en Cambes, en la studio de Jean-Paul Nogues, por la parta registrado de la KD de Moríza, *Amrenkontoj*. Temis pri kanzonoj en Esperanto.

La studio situas piede de klifo, el kiu oni povas admiri la vastan pejzaĝon de la garonaj bordoj. En la studio vidiĝas multaj profesiaj registr-aparatoj, ege imponaj por ni, kiuj neniam eniris tian laborejon.



Ni povis konstati, kiom la registrad-laboro estas malfacila! Morine kaj Isabelle devis ĉiumomente esti plej koncentrataj, ĉar la plej eta difekto nuligas la registradon. Ĉio devas esti kiel eble plej perfekta: la voĉo, la notoj, la takto, la preciza prononco de ĉiu vorto...

Jean-Paul sidis ĉe la registrad-tablo. Post kelkaj registrad-provoj, Morine, Isabelle kaj Jean-Paul aŭskultis la provojn, kaj elektis inter ili la plej kontentigajn.

Ni iom ripozis inter la registradoj, kaj reprenis kelkajn fortojn sub timema aprila suno, per bonegaj ruĝa vino kaj torto.

Kiam finiĝis la tago, kvin kanzonoj estis «en la skatolo», pretaj por finpolurado!

Janine



Souscription pour un nouveau CD

Antaŭmendo por nova KD

Moríza est la rencontre musicale d'une soprane, Morine STRIDE et d'une pianiste, Isabelle DIAZ qui partagent leur passion depuis plus de 7 ans (concerts, récitals, conférences musicales, mariages, obsèques, fêtes, ...) Pour elles, la musique est le vecteur par excellence qui met chaque être en contact avec les profondeurs insoupçonnées de son âme. L'Amour est chanté de maintes manières depuis des siècles et les titres de ce disque en sont une modeste représentation, pour le plaisir...

Morlza estas muzika renkonto inter sopranino, Morine STRIDE kaj pianistino, Isabelle DIAZ, kiuj kunpartigas sian pasion de pli ol sep jaroj dum koncertoj, recitaloj, muzikaj prelegoj, geedziĝoceremonioj, funebroj, festoj, ktp. Por ili muziko estas vektoro, kiu rekte kontaktigas ĉiun homon kun la nesuspektitaj profundecoj de lia/ŝia animo. La Amo estas multvarie kantita jam de jarcentoj kaj la titoloj de tiu kompaktdisko spegulas nur modestan prezenton, por plezuro...

Bulletin de commande pour la souscription / *Antaŭmendilo*

A retourner à / *sendenda al* : ESPERANTO---GIRONDE cte Monique Dussenty – 76 avenue Lafontaine FR---33560 Carbon---Blanc

Nom du souscripteur – *Antaŭmendanto* :

.....

Adresse / *Adreso* :

.....

.....

CP / *poŝta kodo* :

Ville / *urbo* :

Pays / *lando* :

Nombre de CD commandés / *Nombro da menditaj KD* :

X 8,00 € = Total / *Sumo* :

Chèque à libeller au nom de : ESPERANTO-GIRONDE



LA KOMPANOJ DANKAS

Korajn dankojn al La Verda Stelo – Espéranto 94, la grupo de Limoço kaj al Pierre Labbé pro iliaj donacoj, por la partopreno en la financado de la surstrata kunkantado en Lillo aŭ por la eldono de la KD de Moríza!



KANZONSTAĜOJ KUN LA KOMPANOJ



BELAJ SURPRIZOJ EN GRAY (70)

En la mirinda esperanto-muzeo de Gray La Kompanoj estis akceptitaj de Micheline, filino de Geo Junier, kreinto de la muzeo kaj Rolando Cuenot. La kunkantado okazis en bela ŝtona kelo sub la muzeo! Al la akordiono de FaMo, violono de Fransoazo, suzafono de Bernard, aldoniĝis gitaro de Annie kaj lastminute violono de Manon. Ĉi lasta profesie ludas en la simfonia Burgonja orkestro de Diĵono! Kia regalo!



Krome trideko da kunkantantoj grupiĝis tie, kaj kelkaj ne hezitis veturi pli ol du horoj el Monbeliard, Besançon (25) aŭ el Vogezoj (88) por pasigi la tagon inter ni! La repertuaro varmigis la etoson kaj ĉiuj kunĝuis tre agrablan tempon.

Marcelo



STAĜO DE LA KOMPANOJ EN LIMOĜO (87)

Ni retroviĝis, dudeko da fervoraj kantemuloj, por kune praktiki nian ŝatatan okupiĝon dum la semajnfino de la 18a kaj 19a de aprilo. Nin gastigis la naturcentro La Loutre (La Lutro), kelkajn kilometrojn for de Limoĝo. Isabelle Jacob estis por ni ĉiuj nekomparebla gastigantino, kiu ĉion organizis por nia komforto kaj preparis luksajn bongustegajn manĝojn.



FaMo kaj Marcelo Redoulez kondukis tiun entuziasman grupon.

Por nin akompani estis, aldone al la akordiono de FaMo, la gitaro de Pjer Buvje', la violono de Fransoazo Noaro', la suzafono de Bernard Legeay.

Sabaton matene, ni provkantis plurajn kanzonojn de la Surstrata Kantado. Post la tagmanĝo, Isabelle proponis al ni etan botanikan piediron en la tutapuda arbaro.

Ni plue provkantis dum la posttagmezo, ekstere sur la korto kaj interne en la salono, tiel ke du trionoj el la tuta kanzonaro estis provkantitaj antaŭ la vespermanĝo. La vespero estis dediĉita al la kantiga lumbildaro, belega laboro de Marcelo, kiu ebligis nin ankoraŭ pli bone enkapigi la kanzonojn.



Dimanĉon matene, ni laboris pri la restantaj kanzonoj, kaj poste ni seninterrompe kantis ĉiujn kanzonojn, kun diversa sukceso, sed ja gravas entuziasmo!

Ni kun plezuro konstatis, ke ni progresas de unu staĝo al la alia.

Ni disigis dimanĉon ĉirkaŭ la 17a, certaj, ke la Lillan publikon allogos nia nerezistebla energio!

Janine



GRATULOJNI

Unu el la plej junaj kompanoj en *La Pariza Komuno*, Guilhem (kiu rolis Gavroŝ'), ĵus patriĝis la 1an de junio; lia filo nomiĝas Romain Alessandro.

Ni gratulas ne nur la gepatrojn, sed ankaŭ Bernardon kaj Rose, la geavojn!



Katherine PANCOL

Sur un air de Robert Desnos

U ne manif de cent mille mètres avec des pingouins tout en tête,
Ça n'existe, ça n'existe pas.
Un défilé de millions de gens qui tapent des mains en criant li-ber-té, li-ber-té d'ex-pres-sion,
Ça n'existe, ça n'existe pas.
Une manif pleine de pancartes et de chansons,
De bouilles rondes, de bouilles carrées, de bouilles crayons,
Ça n'existe, ça n'existe pas.
Une manif qui court le monde,
Parle français, javanais, espéranto,
Ça n'existe, ça n'existe pas.
Une manif de même pas peur,
Tous unis, tous différents.
Ça n'existe, ça n'existe pas.
Une manif pour que jamais ça recommence,
La haine et la folie à l'infini,
Sous le ciel des Tropiques ou de France,
Ça n'existe, ça n'existe pas.
Mais si, mais si, c'est arrivé,
Pas plus tard que dimanche 11 janvier
De cette nouvelle année.
Et de là-haut, avec Desnos, ils nous r'gardaient,
Buvaient un verre, s'tapaient la cloche,
Tournaient les pouces, roulaient carrosse.
Ils se marraient, lançaient du riz et du whisky
Des Chocapic, des confettis.
Criaient : « Ne changez pas, restez ainsi,
Marchez tous les dimanches et les lundis, les mardis
et les mercredis
Et tous les jours de la semaine sans répit,
Battez le pavé, restez debout et rigolez, rigolez ! »

Laŭ la poemo La Fourmi de Robert Desnos
(El Nous sommes Charlie 60 écrivains pour la liberté
d'expression, Livre de Poche)

La Fourmi



*Une fourmi de dix-huit mètres
Avec un chapeau sur la tête
Ça n'existe pas ça n'existe pas*

*Une fourmi traînant un char
Plein de pingouins et de canards
Ça n'existe pas ça n'existe pas*

*Une fourmi parlant français
Parlant latin et javanais
Ça n'existe pas ça n'existe pas*

Et pourquoi pas ?

*Robert Desnos
Chantefables*

La Formiko

*Formiko dekokmetra
Kun ĉapel' sur la kap'
Ne ekzistas tio, ne ekzistas tio*

*Formiko, kiu trenas ĉaron
Plenan de pingvenoj kaj anasoj
Ne ekzistas tio, ne ekzistas tio*

*Formiko, kiu parolas france
Kiu parolas latine kaj jave
Ne ekzistas tio, ne ekzistas tio*

Nu kial ne ?

Esperantigis Janine



Robert-Desnos-ece

Centmil metrojn longa manifestaci', kun pingvenoj
ĉe la kapo,

Ne ekzistas tio, ne ekzistas tio.

Plurmilionaj defiluloj, kiuj manbatas
kriante «li-be-rec', li-be-rec' de esprim'»,

Ne ekzistas tio, ne ekzistas tio.

Manifestaci' plena de tabuloj kaj de kanzonoj,
De vizaĝoj rondaj, de vizaĝoj angulaj, de vizaĝoj
kraĵonaj,

Ne ekzistas tio, ne ekzistas tio.

Manifestaci', kiu iras tra la mondo,

Parolas france, jave, esperante,

Manifestaci' de «eĉ ne tim' ,

Ĉiuj unuigaj, ĉiuj malsamaj».

Ne ekzistas tio, ne ekzistas tio.

Manifestaci', por ke neniam plu revidiĝu

Hato kaj frenezo senfinaj,

Sub la ĉielo de Tropikoj aŭ de Francio.

Ne ekzistas tio, ne ekzistas tio.

Tamen jes, jes ja, tio ĵus okazis,

Dimanĉon, la 11an de januaro

De tiu nova jaro.

Kaj de supre, kun Desnos, ili nin rigardis,

Kaj kuntrinkis, kaj kunmanĝis,

Pigrumadis, amuziĝis.

Ili ridegis, ĵetis rizon kaj viskion,

Bombonojn kaj konfetojn.


Alkriis «Ne ŝanĝiĝu, tiaj plu restu,

Marŝadu dimanĉojn kaj lundojn, mardojn

Kaj merkredojn

Kaj ĉiujn tagojn de la semajno senĉese,

Tretadu la pavimon, kaj plue staru, kaj ridu, ridadu!»



Esperantigis Janine

ANONCO

FRANCA ESPERANTO-INSTITUTO

(Lingva institucio komuna al UFE kaj SAT-Amikaro,
je la dispono de ĉiuj esperantistoj kaj esperantistaj organizoj en Francio)

Nia kunsido okazis la dimanĉon 5-an de oktobro 2014 en la sidejo de SAT-Amikaro.

La studendaj verkoj por la Atesto pri Supera Lernado restos la samaj por tiu ĉi jaro:

- La fotoalbumo de Trevor Steele
- Ĉu vi konas Blaise Cendrars? de Manuel de Seabra
- KREDU MIN, Sinjorino de Cezaro Rossetti
- Ne ekzistas verdaj steloj de Liven Dek

La kunvenantoj devis plian fojon konstati la malmultecon de kandidatoj. Entute okazis nur tri sesioj en 2014, kun entute 11 kandidatoj. Leviĝis la demando, ĉu tiu malabundeco ŝuldiĝas al la konkurenco de la KER-ekzamenoj, kiuj konas grandan sukceson. Fakte, ambaŭ ekzamen-sistemoj devus esti rigardataj komplementaj, kaj ne konkurencaj. La FEI-ekzamenoj taksas la kapablon traduki al kaj el la franca, kaj la sciojn pri movada kulturo. Pri tiuj ĉi aspektoj la KER-ekzamenoj tute ne okupiĝas. Plie, pluraj FEI-anoj atentigis, ke la momenta sukceso de la KER-ekzamenoj grandparte dependas de la bontrovo de la nuna registaro en Hungario, kaj ke tio povos esti nuligita okaze de reĝim-ŝanĝo. Tial FEI opinias ke gravas konservi la unuan kaj duagradan ekzamenojn, kiujn kelkaj volis forigi.

Sed antaŭ ĉio plej gravas instigi niajn kursgvidantojn puŝi siajn lernantojn al trapaso de ekzamenoj. Neniu homo trapasis la Kapablecon en 2014. Do, ne hezitu kaj elektu unu el la tri fakaj branĉoj: pedagogio, turismo kun interpretado, sciencoj kaj teknikoj.

Se la tarifoj por la diversaj ekzamenoj estas obstaklo por vi, vi povos peti helpon de via grupo (jam kelkaj tion faras.).

Por pliaj informoj ne hezitu viziti nian TTT-ejon: <franca-esperanto-instituto.net>

Ĵak Le Puil, Sekretario



GRAVA INFORMO

Ni ĵus atingis la centan leganton, kiu ŝatas la Fejsbuk-paĝon de Esperanto-Gironde, ne nur en Ĝirondio, sed en tutmonda skalo : de Brazilo ĝis Rusio, de Pollando ĝis Vietnamio... Ĉe la plej famaj esperantistoj, oni povas rimarki la subskribon de Renato CORSETTI.



Bernardo

Ni funebras

Ni eksciis pri la forpaso de nia amiko Bernardo MOYNET el Arcins. Bernardo estis 82jara.

Ni plej kore kondolencas al Jacqueline.

Mi memoras, ke Bernardo fabrikis por la anoj de Esperanto-Gironde, esperantan Scrabble, kun pleto kaj lignaj literoj.

Monique



En Arcins, kun lia germana esperantista amiko Rudy, en 2001



*Laborgrupo en Cenon en 1990
(Bernardo staras maldekstre)*

Li restos por mi "La reĝo" de nia vizito ĉe Oĉjo Georges, tre lerta, faka manlaboristo... kaj ŝercema magiisto!

Marcelo



Malaperis magiisto.



OMAĜE AL BERNARDO MOYNET

Mi ne plu memoras precize kiam mi renkontis Bernardon, ĉu antaŭ, ĉu post mia restado en Bora-Bora. Pli aĝa ol mi, li estis ankaŭ ege pli kuraĝa. Li devis veturi dum unu horo por veni partopreni en la instruado de Leo. Fake, li agis kiel lignaĵisto en Arcins, kie staris lia metiejo. Li multe laboris por akiri la scion de la lingvo, kaj li fieris kiam, post kelkaj jaroj, li vizitis sian korespondanton en Rusio.

Bernardo ĉiam partoprenis en niaj staĝoj, kaj eĉ animis niajn vesperojn. Fakte unufoje mi timis pri Rose, kiu estis ensakigita, kaj feliĉe ŝi denove aperis: Bernardo magiis!

Bernardo rolis la reĝon en la unua spektaklo de *La Kompanoj* dum la Sat-Amikara kongreso en Amboise. Ne plu restas multaj homoj el tiu tempo!

Li ankaŭ senĉese elpensis novajn maŝinojn por vigligi niajn budojn en diversaj forumoj. Tiuj, kiuj ne vidis lian inventaĵon por, interalie, montri kolekton de poŝtkartoj, certe maltrafis gravan parton de la vivo de **Esperanto-Gironde**.

Sed nubo aperis foje: li tre volonte akceptis nin siahejme en Arcins, kaj li preparis elmontradon pri sia fako. Li esperis ĉirkaŭ dudek homojn, kaj ni estis apenaŭ duono. Mi memoras kiel li sentis sin trompita kaj malgaja post ege granda preparado.

Kaj iom post iom, Bernardo malaperis el niaj renkontoj. Li ne plu bone aŭdis, kaj ne plu povis konversi kun aliaj grupanoj, do li preferis sidadi hejme.

Sed la pli malnovaj anoj de nia grupo memoros lin emocie kiel grandan aktivulon de la lasta jardeko de pasinta jarcento ene de nia grupo.

Bernardo S.



*Kun Ŝelin' kaj Simonne:
Bernardo kaj Jacqueline,
en 2004 en Arcins*

STAĜOJ



Julio 06a -13a: Ferioj - Familioj - Interŝanĝoj Reciprokaj RERS

Julio 20a-25a: Kasteloj de la Luaro - Turisma semajno - UK-antaŭkongreso

Aŭgusto 01a-08a: Lingvoj kaj kulturoj de la mondo - postkongreso

Aŭgusto 08a-16a: Festa Semajno por infanoj kaj familioj - post-IIK

Oktobero 23a-nov 01a: AŬTUNE, lingva seminario kun Christian Rivière kaj Janine Dumoulin, AMO-seminario kun Stefan MacGill

M.C.E. Château de Grésillon, St. Martin d'Arcé 49150 BAUGÉ-EN-ANJOU

Tel.: 02 41 89 10 34 (aŭ 09 51 64 10 34) - Informoj: gresillon.org

<http://gresillon.org>



Junio 13a-14a: Kanti en Esperanto kun la Kompanoj kun FaMo kaj Marcelo Redulez'

Julio 6a-10a: Praktikado de la lingvo plurnivela kun Ansofi Markov

Aŭgusto 10a-14a: Promeni tra naturo kaj Vikipedio kun Alain Favre

Oktobero 19a-23a: Praktikado de la lingvo plurnivela kun Ansofi Markov

KVINPETALO Esperanto-Centro, 4 rue du Bureau 86410 BOURESSE

Tel.: 05 49 03 43 14 (aŭ 06 07 31 67 81) - Informoj: kvinpetalo.org

<http://kvinpetalo.org>

NIAJ KURSOJ

- A **GUJAN-MESTRAS**, le jeudi de 15h à 17h, cours pour débutants, au-dessus du centre St Exupéry, face à la gare SNCF. (06 95 02 85 00)

- A **CREON**, le jeudi tous les 15 jours de 14h à 16h, cours pour débutants chez Moline STRIDE, 17 rue Voltaire. (06 10 07 08 58)

- En **GALGON**, ĉiun lundon de la 17a 30 ĝis la 19a 30, Joël LAJUS gvidas kurson por komencantoj kaj progresantoj. (05 57 69 26 96)

- En **CENON** (Kastelo Palmer), ĉiun lundon inter la 14a kaj la 17a, Marcelo REDOULEZ gvidas traduko-grupon. (05 56 21 38 64)

- En **MONTENDRE**, ĉiun mardon de la 10a ĝis la 12a, Janine Dumoulin gvidas kurson por ĉiuj niveloj. (05 46 49 45 18)



Kiel Bertono Le Maire, estis trompita de Renardo, kaj kiel Renardo estis trompita de Nigreto.

Petro, kiu naskiĝis en Sankta-Klodoaldo, cedante al deziro de siaj amikoj, long-tempe maldormis por versigi plurajn ĝojajn artifikojn de Renardo, tiu malica nano, pri kiu tiom da bonaj homoj pravis plendi. Se oni volas iom silenti oni povos trovi tie-ĉi temon por pli ol unu bona instruo.

Estis en majo, monato kiam ekfloras kratago, kiam arbaretoj kaj herbejoj reverdiĝas, kiam birdoj nokte kaj tage pepas novajn kantojn. Nur Renardo ne plene ĝojis, eĉ en sia kastelo de Maupertuis: liaj vivrimedoj elĉerpigiĝis; iam liaj familianoj havante nenion por manĝi lamente kriadis, kaj lia kara Hermelina, ĵus naskinta, estis ĉefe lacega pro bezono. Do li rezignacie forlasis tiun rifuĝejon; li foriris ĵurante per la sanktaj relikvoj, ke li ne revenos sen realporti hejmen abundajn proviantojn.

Li eniras la arbareton, lasante malkdekstre la pliužitajn vojojn; ĉar tiajn vojojn li ne laŭiras. Post mil kaj mil zigzagoj li fine malsupreniras sur la herbejon.

- Ah! Sankta Maria! tiam li diris, kie ajn trovi lokojn pli agrablajn! Jen surtera paradizo aŭ preskaŭ: akvoj, floroj, arbaretoj, montetoj kaj herbejoj. Feliĉa tiu kiu povus ĉi-tie travivi sian tutan vivon, kun ĉiam abunda kaj facila ĉasaĵaro! Sed la plej verdaj kampoj, la plej bonodoroaj floroj, tamen ne malverigas la proverbon: bezono maljunulinojn trotigas.

Longe ĝemante, Renardo reekiris. Malsato kiu pelas lupon el la arbareto hastigis liajn krurojn. Li iras malsupren supren, li gvatas en ĉiu loko, ĉu hazarde iu birdo, iu kuniklo iĝas atingebla. Al la najbara farmodomo kondukis pado. Ĝin laŭiras Renardo decida proprariske viziti la lokojn. Jen li antaŭ la barilo: sed serpentumante inter heĝoj kaj sambukoj li preĝas, por ke Dio gardu lin kontraŭ misrenkonto kaj ke li sendu al li ion por reĝojigi la edzinon kaj la tutan familion.

Antaŭ ol plu rakonti indas diri, ke la farmodomo apartenis al la plej bonhava nenobelo kiun oni povis renkonti de tie ĝis Trojo (kompreneble tiu malgranda Trojo kiun la reĝo Priamo neniam regis). La domo ĉe la korto estis abunde provizata per ĉio kion oni povas deziri sur kamparo: bovoj kaj bovinoj, ŝafinoj kaj

ŝafoj, kokinoj, kaponoj, ovoj, fromaĝoj kaj lakto. Feliĉa estus Renardo se li kapblus trovi rimedon por tien eniri.

(Daŭrigota)



Desegno Morin'



LA KOMPANOJ EN LILLO 2015

LA KOMPANOJ daŭre preparas la artajn erojn de la 26a kaj 27a de julio dum la 100a UK en Lillo. Cetere ili prezentos budon dum la Movada Foiro de sabato la 25a.



Morine kaj Isabelle patoprenos en la malferma ceremonio de dimanĉo la 26a, kaj estos denove parto de la Nacia Vespero.

Dum la Nacia Vespero, la spektaklo inkluzivos interalie la prezenton de kelkaj kanzonoj de nia «Surstrata Kunkantado» sur la Operej-Placo de Lillo, lundon la 27an.

Se vi emas kunkanti, ne hezitu parkerigi la enprogramitajn kanzonojn de la Nacia Vespero: ***Mina mond'***; ***La kongresurboj***; ***Estas ĝoj' verda***; ***Lili***; ***La dizertonto***; ***Volas mi***; ***La nord-irlanda balado***; ***Tuj la kompanar'***; ***Kisu min ankoraŭfoje***.

Tiel vi povos sursceneje (aŭ meze de la aŭdantaro) kunkanti!

La kanzon-libreton (kun la vortoj kaj partituroj de ĉiuj kanzonoj de la Surstrata Kunkantado) vi povos ricevi okaze de la venontaj staĝoj en Kvinpetalo, la 13an-14an de junio (vd. p.13), kaj en Artigues-près-Bordeaux, la 11an-12an de julio.

Vi povas ankaŭ elŝuti la vortojn kaj partiturojn de ĉiuj kanzonoj ĉe la retejo de LA KOMPANOJ : <lakompanoj.free.fr>. Tie vi trovos ankaŭ la registraĵojn de la diversaj kanzonoj.

Nepre vizitu la retejon de LA KOMPANOJ, kaj ne maltrafu ebrigan kaj neforgeseblan partoprenon en la unika 100a Universala Kongreso en Lillo (25a de julio — 1a de aŭgusto 2015)... kun LA KOMPANOJ!



ESTRARO
de
« ESPÉRANTO-GIRONDE »

* * * * *

Centre Culturel Château Palmer
33150 CENON
Banque Postale:
347771 F Bordeaux

* * * * *

Prezidanto: **Bernard SARLANDIE**

24, rue des Bosquets de Venteille
33185 LE HAILLAN

Tel: 06 83 29 40 13 / bernard.sarlandie@gmail.com

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**

2, chemin des Nauves

Chardes 17130 MONTENDRE

Tel: 05 46 49 45 18 / janinedum@neuf.fr

Help-sekretariino: **Morine STRIDE**

Kasistino: **Monique DUSSENTY**

76 avenue La Fontaine

33560 CARBON BLANC

Tel: 05 56 06 74 49 / monique.duss@free.fr

* * * * *

Materialon por LEGI bv. sendi al la sekretariino aŭ al:
Yannick DUMOULIN —> yannickdum@free.fr

